# Novjorka Prismo

Numero 131 — Februaro 2004


*La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia februara kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 20-an de februaro 2004, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigajoj.
7:00 – Thomas Eccardt prelegos pri "Kio Estas Scienco: La Filozofio de Scienco" ★

## Protokolo de la kunveno de la 16-a de januaro 2004

Nur ĉeestis 8 personoj, dank' al la terure malvarma vetero. Antaŭ la komenco de la kunveno, la ĉeestantoj diskutis pri la neoficiala uzo de la angla kiel la oficiala lingvo de Usono, kaj pri la strangaj parolmanieroj de kelkaj usonaj prezidentoj.

Je 7:08 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon.

Brian DRAKE nur komencis lerni Esperanton antaŭ 4 monatoj. Li provis disvolvigi sian propran lingvon, sed li malkovris, ke Esperanto jam havas la bonajn kvalitojn, kiujn li volus enmeti en sian lingvon. Li ankaŭ ĉeestis la neformalan kunvenon je la komenco de ĉi-tiu monato. Li ĉeestis ĉi-nokton sian unuan formalan kunvenon ĉe nia klubo.

Sofiya SOSKINA kaj mi ne ricevis antaŭ la kunveno la ĉi-monatan numeron de *Novjorka Prismo*, do ni ne povis komenti pri la ĝusteco de la informo en la numero. Rochelle F. GROSSMAN nur havis demandon pri la ĝusta literumo de unu el la nomoj en la listo de la klubanoj pagintaj por la jaro 2003. La nomo de sinjoro INUI devas skribiĝi: Mitsutaka.

Tomaso laŭtlegis karton el Brazilo de Eliana, kiu ankaŭ telefonis al Rochelle, dum Rochelle estis ĉe la novjorka oficejo de UEA. Rochelle ricevis noton de Prenda COOK el Teksaso. Rochelle ankaŭ ricevis karton de Laura MILLER el Eŭropo. Rochelle anoncis, ke ELNA faras specialan oferton por kopioj de la libro *Faktoj kaj Fantazioj* de Marjorie BOULTON.

Je 7:31 ptm, Alex KARKOVSKY komencis sian prelegon pri la verkoj kaj la vivo de Julius BALBIN. Alex renkontis Julius la unuan fojon en Bulgario en la jaro 1978. Julius estas travivinto de la Holokaŭsto, kiu skribas pri koncentrejaj tendaroj, brutalaj homoj, kaj eĉ hundo, kiu atakis judojn je la komando de sia estro. Alex deklamis kelkajn poemojn en Esperanto, kaj Tomaso deklamis poemon en la angla.

Nijl BLONSTEIN alportis valizon da libroj, kiujn Julius posedis dum li loĝis en Novjorko. Je 8:16 ptm, Nijl aranĝis la librojn sur la tablon. La ĉeestantoj elektis kaj aĉetis librojn. Ili

(daŭras je paĝo 2)



*Alex Karkovsky respondas al demandoj post sia prelego pri Julius Balbin. Sofiya Soskina sidas malantaŭ li, kaj dekstren de la fenestro estas Brian Drake, Nijl Blonstein, kaj Stuart Green.*

## E-enciklopedio

*Esperanto* revuo 1/2004 sciigas, ke maturiĝis E-vikipedio, kie vi povas ne nur legi, sed verki aldone artikolojn kaj korekti/pridiskuti jam ekzistantan. La adreso estas

*<http://eo.wikipedia.org>*

en Esperanto (en la angla *<http://en.wikipedia.org>*, en la Rusa *<ru ...>*, ĝi estas en kelkdeko da lingvoj). Nepre, legu, uzu, korektu. ★

– *Alex KARKOVSKY*

## IBM Plaza

La unuan tagon de februaro estis dimanĉo, kaj pli malpli dek esperantistoj venis al IBM Plaza, spite la malvarman veteron. Ni parolis pri politiko ĝenerale, kaj pri la politiko en la publika eduksistemo de Novjorko. ★

– *Tom ECCARDT*

## Saluton al ĉiuj !



Mi estas franca komencanta esperantisto (mi komencis je decembro), kaj mi faras staĝon en Novjorko ĝis majo. Mi estus tre feliĉa renkonti vin, kaj paroli Esperanton kun vi. Mi malfeliĉe ne povis veni [hieraŭ] dimanĉe, sed mi esperas ke estos aliaj renkontoj! ★ Amike,

– *Vincent JACQUES*
*<Vincent.JACQUES@mailhec.net>*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Februaro 2004** — **20**

**ESNY KUNVENO**
Thomas Eccardt prelegos pri "La Filozofio de Scienco"
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Marto** — **7**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe **IBM Plaza***
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 132)

**19**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*


United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)


"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Protokolo *(daŭras de paĝo 1)*

pagis al la kasistino. La prezoj estis malmultekostaj. Oni ne faris aŭkcion, tamen ne estis konflikto inter personoj, kiuj volis aĉeti la saman libron. La libroj temis pri lingvistiko, fremdlingvoj, religio, kaj filozofio. Preskaŭ neniu el la libroj estis verkita en Esperanto.

Je 8:48 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kvar el la ĉeestantoj iris al la restoracio World Cafe





por manĝi. Ni diskutis pri la malsimpleco de la gramatiko de fremdlingvoj. Ni restis tie ĝis 10:30 ptm. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Volas korespondi

Saluton!!! Mi nomo estas IRINA. Mi loĝas en Ruslando, en urbo KRASNOJARSK, en Siberio. Mi studas en Komerca-Ekonomia instituto. Mia estonta profesio estas ekonomisto. Al mi estas 20 jaroj. Mi studas anglan lingvon. Mi estas komencanta Esperantistino. Vi estas la unua al kiu mi skribas. Mi tre interesas pri aliaj lingvoj, aliaj tradicioj. Mi ŝatas vivon!!! kaj miajn amikojn!!! Miaj hobioj estas fotoj – mi ŝatas foti miajn geamikojn – naturon, aŭskulti interesan muzikon (nunan kaj klasikan), kaj vojaĝi, trovi novajn homojn, mi ŝatas naĝi, promeni en arbaro. Mia naskiĝtago estas la trideka de majo. Mi atendas vian respondon! ★



– *Irina VOLOBUEVA*
*<krasnui@mail.ru>*
*RU-660132, Ruslando, Krasnojarsk, ul. Slavu 13-99, a/R 22899*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Korespondа Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt (212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman (718) 457-1490 | Stuart Green (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Thomas Leong (718) 961-4252 | Sofiya Soskina (914) 738-6084 | Neil Blonstein (212) 663-2020 |

**Novjorka Prismo**
Numero 131 – Februaro 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano (212) 982-5029 | Thomas Eccardt, Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2004 Esperanto Society of New York